

# TEJO-STRATEGIO

## Enkonduko

Post analizado de strategia planado kaj realigado en TEJO, komunikaj defioj, komparado de la modelo kun aliaj internaciaj organizoj kaj ekstera konsultiĝo, ni prezentas al vi la proponon de la Estraro.

## Strategia plano

La nova strategia plano, mallonge *Strategio*, vivos de 2018 ĝis 2020. Trovu ĝin jene: <https://docs.google.com/document/d/1HfooF369XPIHxTKkJBwLPhtJCIPbeS6v4NhQOdQUIR8/edit>

Temas pri mallonga kaj kolora dokumento kun la jenaj trajtoj:

- La agado estas dividita en **2 agadkampoj**:
  - Junulara movado.
  - Organiza disvolviĝo.
- Ekzistas **5 strategiaj prioritatoj**:
  - *[Kapabligo]*  
Plibonigi la sciojn kaj organizajn kapablojn.
  - *[Eksteraj rilatoj]*  
Krei kunlaboron kun aliaj organizoj kaj sentebliĝi pri lingva justeco.
  - *[Merkatiko]*  
Havi pli kvalitan aleksteran komunikadon.
  - *[Landa Agado]*  
Krei sistemon por engaĝado en TEJO kaj pli forta ligo kun landaj sekcioj.
  - *[Financoj]*  
Certigi daŭripovan financon strukturon en TEJO.
- Sub ĉiu prioritato estas **6-8 strategiaj celoj**. Ili devas esti sufiĉe kompreneblaj sed plikonkretigendaj en alia dokumento.

# Realigplano

Post la kreo de ĝenerala bildo pri kiun direkton ni volas preni, la realigplano gvidos nian ĉiutagan laboron. Sinteze jen troviĝas tabeloj kun la agoj kaj tempumoj.

Du rimarkoj:

- Bezonatas fleksebleco. Tial la Estraro devos rajti fari ŝanĝojn laŭ propra kriterio, sciigante pri ili al la Komitato. Povas okazi diversaj aferoj kiuj devus konduki al ŝanĝo, ekzemple kadukiĝo de la programo EVS, nova aprobita projekto, ekhavo de pliaj dungitoj, disvolviĝo de rimedhaviga ideo, ktp.
- La fakto ke io ne aperas, tio ne signifas ke tio ne okazos. Gvidu nin la strategia plano.

<b>A. PLIBONIGI LA SCIOJN KAJ ORGANIZAJN KAPABLOJN DE NIAJ AKTIVULOJ</b>	
<b>AGO</b>	<b>PERIODO</b>
Partnerserĉado por la februara limdato de Erasmus+	Januaro
Reverkado de amerika-eŭropa projekto Erasmus+	Januaro-februaro
Sendo de raporto pri AEJK	Januaro-februaro
Projektprezento por la februara limdato de Erasmus+	Februaro
Kreado de Mentora Programo	Februaro
Rekonfirmo de organizoj por amerika-eŭropa Erasmus+	Februaro
Funkciigo de Mentora Programo	Marto
Partopreno al evento en Francio kadre de la instruista projekto	Marto
Prezentado de amerika-eŭropa projekto kadre de Erasmus+	Marto
Partopreno al evento en Italio kadre de genregaleca projekto	Aprilo
Realigi duan TEJO-trejnistan renkontiĝon	Marto-aprilo
Kreo de trejnista reglamento	Aprilo

Partopreno al evento en Slovakio kadre de instruista projekto	Julio
Partopreno al evento en Hispanio kadre de genregaleca projekto	Aŭgusto
Realigi retkurson pri landa agado	Aŭgusto
Partopreno al evento en Slovakio kadre de genregaleca projekto	Septembro-oktobro
Partnerserĉado por la oktobra limdato de Erasmus+	Aŭgusto-septembro
Realigi trian trejnistan renkontiĝon	Septembro-novembro
Realigi retkurson pri organizaj kapabloj	Novembro
Projektprezento kadre de Erasmus+	Oktobro
Partopreno al evento en Germanio kadre de genregaleca projekto	Decembro

## **B. KREI KUNLABORON KUN ALIAJ ORGANIZOJ KAJ SENTEBLIGI PRI LINGVA JUSTECO**

<b>AGO</b>	<b>PERIODO</b>
Partopreno en UN ECOSOC Junulara Forumo	Januaro
Registriĝo ĉe la Trasidebla Registro de EU	Januaro
Kontaktado de EU-parlamentanoj, unue por EU-elektoj kaj poste perspektive	Januaro-februaro
Akreditiĝo ĉe Unesko	Januaro-februaro
Mapigi landojn kun Landaj Sekcioj de TEJO kaj kun Naciaj Junularaj Konsilioj	Februaro-marto
Kunordigo kaj pretigo de la stando ĉe YO!Fest 2018	Februaro-aprilo
Partopreno en UNITED-konferenco en printempo 2018	Majo
Okazigo de KER-trejnado dum printempaj Esperantaj aranĝoj (ekzemple dum IJF)	Marto-aprilo

Komuna projekto pri lingvopolitiko kun aliaj organizoj (YEN, EFAY, JEF...)	Aprilo
Kontakti landojn kun landaj sekcioj de TEJO kaj mankas Naciaj Junularaj Konsilioj, por klarigi al ili kiel tio eblas kaj instigi fondadon.	Majo
Kontakti landojn kun landaj sekcioj de TEJO kaj estas Naciaj Junularaj Konsilioj, por klarigi al ili kio tio estas kaj proponi kunlaboron.	Majo
Aktiva partopreno en YO!Fest kaj EYE	Junio
Strategia kunsido pri KER inter TEJO kaj UEA	Junio
Akreditiĝo ĉe KdE	Junio
Havi planon pri kiel atingi membrecon en Naciaj Junularaj Konsilioj por la landoj kie la LS ankoraŭ ne membras tie	Ĝis julio
Akreditiĝo ĉe UN-EKOSOC	Aŭgusto
Akreditiĝo ĉe UN-DPI (fako pri publika informado)	aŭgusto
Akreditiĝo ĉe UNFCC (klimatŝanĝa)	aŭgusto
Konstante kontroli kaj supervidi la agadon de la LSj pri Naciaj Junularaj Konsilioj	Ekde septembro
Partopreno en UNITED-konferenco en aŭtuno 2018	Oktobro-novembro
Partopreno en FoJE-COMEM	Kiam FoJE kunvokos
Partopreno en FoJE-ĜA	Kiam FoJE kunvokos
Kunsidoj de IKRJO	Tra la jaro
IKRJO-FB-paĝo-zorgado	Tra la jaro
Umado kun UN-Junulara Respondeculo (Youth Envoy)	Tra la jaro
Kandidatigo de aktivuloj al eventoj de FoJE	Tra la jaro
Umado ĉe UN-MG CY	Tra la jaro
Umado ĉe UN-MG NGO	Tra la jaro
Kunlaborado pri Junulara Strategio de EU	Tra la jaro

Strukturita Dialogo tra FoJE	Tra la jaro
Kunlaboro por EU-lingvopolitiko kun la junularaj politikaj partioj	Tra la jaro
Konkursoj kaj kampanjoj de UNITED tradukitaj al Esperanto (alvokoj, afiŝoj, materialoj)	Tra la jaro
Materialoj de/pri UNITED tradukitaj al aliaj lingvoj	Tra la jaro
Originalaj kontribuoj al la kampanjoj de UNITED	Tra la jaro
Regula klerigado pri politikaj temoj dum esperantaj eventoj	Tra la jaro
Esplorado kaj eniro en aliaj (sub)kontinentaj platformoj	Tra la jaro
Subteni nacian KER-agadon ĝis plena partopreno (kaj eventuale fondado) de kunordigorgano de junularo (ekzemple nacia junulara konsilio)	Tra la jaroj
Kunlabore kun nacia junulara konsilio, subteni kreon de LSj kie ne estas ankoraŭ	Tra la jaro

<b>C. HAVI PLI KVALITAN ALEKSTERAN KOMUNIKADON</b>	
<b>AGO</b>	<b>PERIODO</b>
Filmado kaj fotado dum JES	Januaro
Konsistigo de tradukteamo en formo de laborgrupo	Januaro
Kreado de nova flugfolio	Januaro
Kreado de reuzeblaj reklamafiŝoj	Januaro-februaro
Kreado de reuzebla prezentaĵo por atelieroj, kun gvidlinioj	Februaro
Ektradukado de varbmaterioj	Marto
Kreado de prezentaĵo por prelegoj, kun gvidlinioj	Marto-aprilo
Filmado kaj fotado dum IJF	Aprilo
Kreado de enkondukaj ekzercoj al Esperanto	Majo

Kreado de kolektujo de sociretaj enhavoj	Majo
Filmado kaj fotado dum IJK	Aŭgusto
Muntado de filmeto pri la internacia junulara komunumo	Oktobro
Funkciigado de la traduka teamo	Tra la jaro

<b>D. KREI SISTEMON POR ENGAĜADO EN TEJO KAJ PLI FORTA LIGO KUN LANDAJ SEKCIOJ</b>	
<b>AGO</b>	<b>PERIODO</b>
Elekto de propono gastigi IJK 2019	Januaro
Plibonigo de KODEJO	Januaro
Enketado per KODEJO	Januaro-februaro
Pretigo de jarraporto por la ĝenerala publiko	Februaro
Kreado de organizmembrara enketilo	Marto
Publikigo de KODEJO-raporto	Marto
Prikonsidero de havado de volontulo en Afriko	Marto
Enketado al la membraro	Aprilo
Publikigo de rezultoj kaj konkludoj pri la membraro	Majo
Invito al konkurso por iĝi landa sekcio de la jaro	Aprilo
Elektado de landa sekcio de la jaro 2017 kaj planpreparoj	Junio
Okazigo de IJK	Aŭgusto
Okazigo de komitatkunsido dum IJK	Aŭgusto
Anonco dum IJK de la premiita landa sekcio de la jaro	Aŭgusto

Publikigo de malferma alvoko por inviti IJK 2020	Septembro
Kontaktado kun landaj sekcioj kaj referencpunktoj por kuraĝigo kaj helpado	Tra la jaro

<b>E. CERTIGI DAŬRIPOVAN FINANCAN STRUKTURON EN TEJO</b>	
<b>AGO</b>	<b>PERIODO</b>
Esplorado pri novaj monfontoj	Februaro-marto
Raportado al EACEA pri administra subvencio 2017	Marto
Pagigo de kotizoj al niaj sekcioj	Marto
Proponado kaj diskutado pri nova membrec-kotizosistemo	Marto
Voĉdonado pri nova membrec-kotizosistemo en la Komitato de UEA dum UK	Julio-aŭgusto
Revizio kaj eventuala resubskribo de kontrakto por projektverkado kaj asistado	Julio
Sendo de mesaĝo al patronoj kun la jarsukcesoj kaj invitante repatroniĝi	Decembro
Okazigo de membrara varbkampanjo	Tra la jaro